

Esperanto en Danio

15-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2008



Manifestacio dum la Eŭropa Socia Forumo

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Ejnar Hjorth (vicprezidanto)

Bent Jensenius

Rasmus Høyrup Jensen

Ole Terkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 32 50 50 88 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.02.2009

Enhavo

Vi trovos.....	3
Eŭropa Socia Forumo 2008.....	4
Lingva festivalo 2008.....	5

La starpunkto de UEA pri lingvaj rajtoj.....	6
UEA en Socia Forumo de UN. .8	
Pensoj pri la interna ideo.....	10

Argentina vizito.....	12
Esperanto-ekzamenoj.....	12
Tago de la asocioj.....	16

Blograporto.....	17
Kaj Ĉumbelić-Røssum.....	18
Germana / Eŭropa kongreso. 19	

Forpasis Günter Becker.....	20
Forpasis Bernard Golden.....	20
TEJO 70-jara.....	21

Paperaj gazeteltondaĵoj.....	22
Kluba vivo: Kopenhago.....	23
Zamenhoftago en K-hago.....	24

Nova Esperanto-muzeo.....	25
Kluba vivo: Næstved.....	25
Anonco.....	27

Vi trovos...



... ke ĉi tiu numero de Esperanto en Danio estas iom pli kolora ol kutime. Ni trovis novan malpli kostan presejon, kaj por 2009 ni planas aperigi la revuon kvin aŭ ses fojojn, anstataŭ la nunaj kvar; kompanse ĉiu numero havos 24 anstataŭ 28 paĝojn. Eĉ tiam ni kompreneble ne havos spacon por raportoj ĉion raportindan pri la monda

Esperantovivo, sed ni almenaŭ sukcesos esti iom pli aktualaj – kaj per tio pli utilaj por la lokaj kluboj.

Fakte ni intencis aperigi ekstran numeron jam ĉi-jare, okaze de la centjara jubileo de DEA. Malhelpis tiun planon la fakto ke la redaktoro de EeD estas samtempe la ĉefredaktoro de la aperonta dana-Esperanta vortaro, kiun ni tiom ege bezonas – la elĉerpita vortaro de Grønberg venontjare havos 50-jaran jubileon! Mi nun estas meze de la litero S, kiu ampleksas ĉ. 14% de la tuta vortaro.

Malkiel vi aliaj (vidu la "Blograporton" de Betty ĉi-numere) mi ne havas vivon ekster Esperanto. Mi do povas promesi ke la vortaro aperos iam en 2009, sed ankoraŭ restas multe da laboro (post litero S ĉ. 15%), kaj ne certas ĉu ni sukcesos fini ĝin antaŭ la jarkunveno. Ho, tio memorigas min:

La venonta jarkunveno
de Dana Esperanto-Asocio okazos

25-26-an de aprilo 2009 en Kopenhago.

Rezervu jam nun en via kalendaro la daton!


Pliaj detaloj sekvos.

Per kio plia do plenigi ĉi tiun paĝon? Ni prenu la venontan Universalan Kongreson de Esperanto en Bjalistoko. Vizitu la retpaĝon <http://94uk.bialystok.pl> por ricevi impreson pri la preparlaboroj kaj aliĝu ĉe http://www.uea.org/kongresoj/uk_alighilo.php. La sekva IJK okazos en Liberec, Ĉeĥio, inter la 18a de Julio ĝis la 25a de julio 2009 (tuj antaŭ la UK en Bjalistoko) – sed tiu ankoraŭ ne havas retan aliĝilon.

Via redaktoro,
Jens S. Larsen

Eŭropa Socia Forumo 2008

La landaj asocioj de Danio kaj Svedio kune kun Eŭropa Esperanto-Unio sukcese kunlaboris partoprenante kune dum la Eŭropa Socia Forumo, kiu okazis de la 17a ĝis la 21a de septembro en Malmö. Dum ĉiuj tagoj funkciis budo, kie la deĵorantoj vigle diskutis kun la vizitantoj kaj disdonis centojn da flugfoliojn en diversaj eŭropaj lingvoj, afable senditaj de la diversaj Esperanto Asocioj de EEU.



La 20-an de septembro matene la prezidanto de EEU Séan O’Riain prelegis pri la temo: ”Egalrajta interkultura dialogo en tutmondiĝanta mondo” enfazante ke Esperanto estus la plej bona solvo por internaciaj lingvaj problemoj, kiuj ĵus tre evidentiĝis dum la Forumo, kie la organizantoj klopodis solvi pere de volontulaj

interpretistoj, sed plej ofte oni tamen uzis la anglan lingvon. Post li, Lars Forsmann enkondukis la partoprenantojn al rekta metodo de lernado. Sekvis vigla diskuto kaj junaj lernantoj de filmlernejo filmis la seminarion.

Posttagmeze okazis granda manifestacio kun partopreno de pli ol 15000 personoj. Nian movadon reprezentis grupo de danaj kaj svedaj esperantistoj de la sunda agado. Esperanto fariĝis videbla ankaŭ en la gazeto de la Forumo, kie ĉiuj 3 partoprenantaj asocioj estis menciitaj. Kompreneble estus dezirinde ke multe pli da esperantistoj partoprenu, sed tio bedaŭrinde malpermesas la financaj rimedoj de la partoprenantoj, kiuj devas mem pagi ĉiujn kostojn. Alia vojo estas komprenigi la diversajn organizojn pri la utileco de komunikado pere de Esperanto. Ni tamen sukcesis ke la hejmpaĝo de la Forumo estis parte tradukita en Esperanto.

Lingva festivalo 2008

Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj DEA kaj KEK aranĝis lingvo-festivalon la 21-an de septembro kunlabore kun la Gepatralingva Asocio. Por la unua fojo la festivalo estis finance subvenciita de la Kopenhaga Komunumo pere de la Kulturdomo kaj de la Loka komunuma grupo de Bispebjerg.

Dum sia malferma saluto Ileana Schrøder akcentis interalie la starpunkton de UEA pri lingvaj rajtoj (vidu la ĉi-sekvan artikolon) kaj Esperanton kiel simbolon de paco kaj demokratia kunvivado pere de egalrajta komunikado.



Mogens Jensen, Abdul Rahman Saleh kaj Séan O’Riain.

Honoraj gastoj estis la prezidanto de EEU, Séan O’Riain, kiu emfazis la gravecon de subteno al gepatraj lingvoj pere de siaj propraj spertoj pri la Irlanda lingvo. Sekvis parolado de la membro de la dana parlamento Mogens Jensen, kiu elokvente kaj varme subtenis plurlingvecon dum sia 20 minutojn longa parolado. Ĉeestis la ambasadoro de Indonezio, Abdul Rahman Saleh, kiu ankaŭ simpatie subtenas Esperanton kaj kiu afable

disponigis tre ĉarman dancistinojn kiu amuzis nin per eleganta danco de la insulo Javo.

Sekvis prezentado de jenaj lingvoj: Esperanto, araba, indonezia, franca, ĉina, irlanda, latina, japana, ivrita, gronlanda, hinda, germana, pola, aramea, latva, angla, eŭska, dana kaj svahila, dum en granda salono bel-aspektaj budoj prezentis la lingvojn pere de libroj kaj aliaj informiloj. La muzika parto konsistis el koncertoj de Latva muzikgrupo, de Hotel' Desperado kaj fine de tre populara dana grupo: la Mezorianta Pacorkestro (Middle East Peace Orchestra).



La starpunkto de UEA pri lingvaj rajtoj

Lingvaj rajtoj estas esencaj por ĉiu popolo, sendepende de la grandeco de ties membraro. Tiu rajto devas esti protektata ĉefe por malgrandaj grupoj. Universala Esperanto-Asocio (UEA) subtenas minoritatajn lingvojn ekde pli ol 100 jaroj.

La rajto de infanoj lerni sian gepatran lingvon kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian gepatran lingvon, ne nur estas grava por ilia kulturo, sed estas fundamenta por ilia psika evoluo. Pluraj larĝskalaj studoj en multaj diversaj landoj demonstris, ke se indiĝenaj kaj minoritataj infanoj estas edukataj ĉefe uzante sian gepatran lingvon, kiel lingvon de la instruado dum la unuaj 6-8 jaroj (kun samtempa, bona instruado de la reganta lingvo kiel dua lingvo, fare de dulingvaj instruistoj), ilia ĝenerala progreso estas pli bona kaj ili lernas la regantan lingvon pli bone ol se ilia instruado okazus per la reganta lingvo. Se ilia instruado en la gepatra lingvo okazas nur dum

unu aŭ du jaroj, kaj poste ili devas transiri al la uzo de la reganta lingvo, eble ili bone sukcesas tiel komence, sed ĉirkaŭ ekde la kvara lernoĵaro, ilia progreso malrapidiĝas, kaj la diferenco inter ili kaj la infanoj parolantaj denaske la regantan lingvon plukreskas.

Ankaŭ tio estas grava ke la homoj kapablu komuniki je diversaj niveloj. UEA rekomendas lerni 2, 3 aŭ 4 lingvojn, laŭ la cirkonstancoj, t.e.

1. la gepatran lingvon
2. la regionan lingvon, se malsamas
3. la nacian lingvon, se malsama ol la du unuaj
4. internacian lingvon, kiu apartenas al neniu nacio, kaj kio estas: Esperanto.

Esperantistoj scias, ke kiam multnacia grupo uzas neŭtralan, komunan lingvon, la kvalito de la komunikado estas ege specifa. La fina celo de Esperanto estas strebi al paco inter popoloj, plifaciligante la komunikadon kaj igante tion pli justa. Uzo de komuna lingvo evitas tian situacion, en kiu la personoj uzantaj sian gepatran lingvon havas grandegan avantaĝon super la aliaj.

Ni dezirus ke Unuiĝintaj Nacioj pripensu tiun temon koncerne siaj propraj kunvenoj. La diferenco estas tre evidenta kiam oni aŭdas partoprenantojn, kiuj sin esprimas en la angla, la franca aŭ la hispana, kaj por kiuj tiu estas ĉu la dua, ĉu la tria lingvo. Kiam parolanto ekparolas uzante sian gepatran lingvon, ofte la diferenco estas impresa - kion li diras, havas multe pli da pezo kaj multe pli allogas la atenton, ol parolanto kiu utiligas fremdan lingvon.

La granda espero de Esperantistoj estas ke la mondo iĝas pli paca loko, kaj ni kredas ke efika komunikado ludas tre grandan rolon por atingi tiun celon.

Referenco: Deklaro pri rajtoj de personoj apartenantaj al naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj minoritatoj, adoptita de la Ĝenerala Asembleo, rezolucio 47/135, je la 18-a de decembro 1992.

UEA en la Socia Forumo de UN

UEA ĉeestis aktive en la tritaga Socia Forumo de la Homrajta Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo (1-3 septembro), kiu traktis la malriĉecon en la mondo. Kiel reprezentantoj de UEA partoprenis tuttempe Charmian Common kaj Stefano Keller, kaj en la unua tago Cesco Reale. Je du okazoj reprezentanto de UEA intervenis alparolante la Forumon.

Post trastudo de la diskuttemoj kaj la sperto dum la unua tago, la delegitoj de UEA decidis interveni en la konkluda periodo. Krom la necesaj informoj pri la proceduro, ili ricevis tre utilajn konsilojn kaj sugestojn de Françoise Mandallaz, kunlaborantino de la ĉefo de la UN-oficejo por ligoj kun NRO-j, Ricardo Espinosa, kiu prelegis en la aprila Datrevena Simpozio de UEA pri lingvaj homaj rajtoj. "Kun s-ino Mandallaz ni jam havis agrablajn kontaktojn dum la organizado de la Simpozio. Ankaŭ ĉi-foje ŝi helpis nin, kvazaŭ ŝi deĵorus tie kiel konsilanto de la esperantistaj intervenantoj", diras Stefano Keller.

Laŭ Keller, pro strategiaj kialoj la reprezentantoj de UEA modifis sian planon kaj anoncis sian unuan alparolon jam por la dua tago kadre de la diskuto post la parolado de Anna Biondi el la Internacia Sindikata Konfederacio. Same kiel Espinosa, ankaŭ ŝi estis konata al la UEA-delegacio kiel preleginto en la aprila Simpozio en sia rolo de vicprezidanto de la Ĝeneva NRO-komunumo.

Keller prezentis proponon de UEA pri kunlaboro por tradukado kaj disvastigo de la konkluda dokumento de la Forumo en Esperanto kaj kelkaj lingvoj aliaj ol la ses oficialaj lingvoj de UN. Post lia interveno Anna Biondi anoncis publike, ke ŝi jam havas kun si informilojn por doni al "miaj esperantistaj amikoj" por la tradukado. La duan fojon UEA intervenis en la konkluda parto, kiam Keller komencis sian paroladon per danko al la interpretistoj pro ilia signifa kaj granda laboro kaj finis memorigante pri la esperantista propono al la Forumo. Ambaŭfoje la prezidanto de la Forumo, Mousa Burayzat, konstanta reprezentanto de Jordanio ĉe UN en Ĝenevo, reagis tre pozitive. Dum paŭzo li kontente malkovris, tra la retejo de la UEA-komisiono pri Meza Oriento kaj Norda Afriko, ke la 1-a Mezorianta Kunveno esperantista meze de aprilo okazis ĝuste en lia lando.

Ankaŭ aliaj ĉeestantoj interesiĝis pri Esperanto post aŭdo pri ĝi kaj prenis informilojn ekspoziciitajn ĉe la enirejo de la salono. Stefano Keller kaj Charmian Common rakontas: "Ni rimarkis, ke nia duopa ĉeesto havis pozitivan efikon, ĉar oficistoj de UN kaj aliaj forumanoj aŭdis nin paroli inter ni en Esperanto kaj tiel povis konvinkiĝi, ke ĝi estas vera lingvo."

La Forumo estis bona okazo por ligi novajn kontaktojn kaj plifortigi tiujn kun prelegintoj de la Datrevena Simpozio, el kiuj ĉeestis, krom Anna Biondi, ankaŭ ŝia antaŭulo kiel prezidanto de la NRO-komunumo, Renate Bloem, kaj ambasadoro Ronald Barnes el Alasko. Reprezentantoj de ŝtatoj kaj de NRO-j dum la tri tagoj kelkfoje aŭdis pri Esperanto. Interalie, antaŭ ĉiu diskutperiodo la prezidanto anoncis, kiuj intervenos, kaj rediris la nomon de la organizaĵo antaŭ ties ekparolo. La lastan tagon eĉ surtabla anglalingva ŝildo anoncis la apartenon de Charmian Common kaj Stefano Keller, sidantaj malantaŭ ĝi, al Universala Esperanto-Asocio.



Stefano Keller

La tekstoj de la esperantistaj intervenoj estos senditaj al la organizintoj de la Forumo en la oficialaj UN-lingvoj. Ekzistas ankaŭ esperanta versio, kiu servis kiel bazo por plutradukoj alilingven. La originala franca teksto de la unua alparolo estas jam rete legebla je <http://uri.fi/LC/>. La dua interveno (kies teksto same aperos en la reto), malpli longa kaj improvizita, estas aŭskultebla rete je <http://uri.fi/YN/>. La alilingvaj versioj kaj ĉiuj dokumentoj rilataj al la partopreno de UEA en la Socia Forumo 2008 estos publikigitaj en la retejo de la Agado por Lingvaj Rajtoj (ALR) je <http://www.lingvaj-rajtoj.org/eventoj/>.

[gaz. kom uea 299]

Pensoj pri la interna ideo

En la jaroj tuj post la komenco de la 1900-a jarcento Zamenhof skribis pri sia interna ideo de Esperanto. Tiu tempo estis tre maltrankvila kun batalado, genocidoj kaj tumultoj kaŭzitaj de diferencoj rasaj, lingvaj, religiaj, naciaj ktp. Kaj en 1914 la Unua Mondmilito komenciĝis.

Li ne nur kreis la lingvon Esperanton sed ankaŭ la tiel nomatan internan ideon. Samtempe li elektis nian verdan flagon kiel simbolon por ĉi tiu interna ideo. Verda kompreneble, ĉar li – kaj ni – esperas je unu paca mondo sen militoj, konfliktoj ktp.

La lingvo estis kreita por faciligi komprenon inter homoj el diversaj rasoj, kredoj kaj nacioj. La interna ideo por klarigi lian celon kun Esperanto. Lia intenco estis ke ĉiuj popoloj en la mondo interfratiĝu egalece, solidarece kaj justece.

Zamenhof ankaŭ apogis kongresojn, ĉar dum kongresoj homoj el la tuta mondo kunparolas kaj vere vivas la internan ideon. Laŭ li kongresoj estas edukejoj de la interfratigita homaro kaj ĉiujare konstanta festo de la homaro kaj de homa frateco.

Liaj deziroj, la entuziasmo kaj idealismo estis utopio dum tiuj jaroj, sed nuntempe la mondo estas alia. Certe estas, ke multaj esperantistoj jam vivigas lian internan ideon sen koni ĝin! Dum kongresoj ni vere ne pripensas religiojn aŭ rasojn, ni nur ĝojas pri la fakto ke oni povas komuniki kun homoj sen devi lerni plurajn lingvojn.

Fakte mi miras ĉu Zamenhof ne sciis pri Unitariismo? Kiel unitariano mi vidas tre grandan konsenton inter lia interna ideo kaj Unitariismo.

Unitariismo temas pri la sama kredo por ĉiuj; unu kredo kiu unuigas ĉiun kredon egale la nomo (islamo, kristianismo, paganismo, agnostikismo ktp.). La nomo ne gravas, ĉar unitarianoj kredas ke ĉiu kredo havas la saman etan parton de la 'vero', la 'dieco'. Ĉiu kredo kutime estas kiel la 'vestaĵoj de la lando/kulturo/tradicio' de unu homo. Unitariismo ne anstataŭas kredojn, sed bonvenigas ĉiun kredon al diservoj kaj diskut-kunvenoj. Ĝi postulas toleremon kaj respekton – ĉiam reciproke! Ni volas unu mondon sen bataloj inter religioj/kredoj, vivante pace kun unu la alia.

Zamenhof deziris krei pacon inter homoj per komuna lingvo. Unitarianoj provas la samon per unu komuna kredo. Ambaŭ pace batalas por pli bona mondo.

En la belaj vortoj de Zamenhof mem:

Sur neŭtrala lingva fundamento
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

Tara Gregers

Fontoj:

L.L. Zamenhof, Festparolado, la 28-an de aŭgusto 1906, Ĝenevo

L.L. Zamenhof, Parolado, la 12-an de aŭgusto 1907, Kembriĝo

Eŭropa Tago de Lingvoj



Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj nia estrarano Bent Jensenius aranĝis ekspozicion de libroj kaj revuoj en la halo de Gladsaxe Biblioteko de la 22-a de septembro ĝis la 4-a de oktobro.


En la hejmpaĝo de la biblioteko oni emfazis la gravecon de lingvoj kiel simbolo de integriĝo kaj paca kunekzisto,

sed ankaŭ pri la Tago de lingvoj por akcenti la diverseco de lingvoj en Eŭropo, kaj informis ankaŭ pri la jaro de lingvoj proklamita de UN kaj pri la 100-jara jubileo de DEA. Sekvis personaj informoj pri la esperantiĝo de Bent kaj lia partopreno en UK kongreso en Jokohamo, kie li ĉeestis kiel helpanto de blinda japana esperantisto.

Argentina vizito

Unu el la plej famaj muzikistoj kiuj kantas kaj verkas en Esperanto, gast koncertis en "Verdensklubben" la 27-an de septembro. Verdensklubben (La Monda Klubo) estas klubo en Amager kiu prezentas diversajn kulturojn de la tuta mondo kaj jam plurfoje prezentis Esperantajn muzikistojn kiel Esperanto Desperado, Timo Väänänen kaj Hotel Desperado. Dum la koncerto Alejandro kantis en la portugala kaj hispana lingvoj enmiksante siajn proprajn kanzonojn kaj tradiciajn muzikaĵojn de Argentino kiel tangon kaj *bossa*.

Dum la dua parto de la koncerto li estis akompanata de anoj de Hotel Desperado kaj kantis plene en Esperanto. Pli ol 20 homoj ĝoje pagis 50 kronojn por spekti la koncerton, el kiuj 6-7 estis Esperanto-parolantoj. Ĉar neniu de la homoj kiuj kutime estas en la kluboj spektis la koncerton, Alejandro venis dum la lundo al la aŭkcio por la KEK klubo kaj kantante vendis tielcele kelkajn de siaj kantoj.



Kim J: henriksen

Esperanto-ekzamenoj en Danio

1908 – 2008

En junio 1908 okazis la unua Esperanto-ekzameno en Danlando. Ĝi estis aranĝita de *Frederik de Skeel-Gjørting*. Anoncis sin dek kandidatoj – inter ili *Margrethe Noll* – naŭ el ili post nur 50-hora instruado. Ĉiuj bone sukcesis; la atingitaj rezultoj variis inter 45 kaj 62 poentoj (minimumo: 28; maksimumo: 70). Je la parola parto oni konsideris korektan prononcon precipe grava.

Ĝis 1928 ne plu estis aranĝitaj ekzamenoj. Fine de la 1920-aj jaroj *Centra Dana Esperantista Ligo* (CDEL) ellaboris novan ekzamenan regularon, kaj oni transiris al la oficiala dana not-sistemo. De tiam longatempe okazis preskaŭ ĉiujare ekzamenoj diversaj:

- I: Unuagrada / elementa nivelo
- II: Duagrada / meza (gimnazia) nivelo
- III: Triagrada / alta (universitata) nivelo
- : Instruokapablo

Komence de la 1950-aj jaroj la *Dana Esperanto-Ekzamena Komisiono* (DEEK) fariĝis institucio sendependa de la Esperanto-organizaĵoj.

Kelkaj statistikaj informoj¹⁾

De 1908 ĝis 2008 sukcese trapasis unu aŭ plurajn Esperanto-ekzamenojn en Danlando:

457 knaboj/viroj
349 knabinoj/virinoj
entute 806 personoj

	Ekzamenoj				
	1908	I	II	III	•
Knaboj/viroj:	5	289	200	3	12
Knabinoj/virinoj:	5	267	119	0	9
Sumo:	10	556	319	3	21

1) ĉerpitaj el la materialo ellaborita por la ekspozicio *Esperanto en Danlando*, kiu estis prezentita unuafoje lige al la Jarkunveno de DEA 2008 en Kopenhago.

	I	II	III	•
1928-1929:	47		1	
1930-1939:	128	104	2	7
1940-1949:	179	88		10
1950-1959:	119	79		4
1960-1969:	46	35		
1970-1979:	20	11		
1980-1989:	4	1		
1990-1999:	6	2		
2000-2008:	6			

1938 estis rekorda jaro: 44 personoj plenumis la unuagradan ekzamenon kaj 30 la duagradan; du personoj krome akiris diplomon pri instrukapablo.

Nur 3 personoj sukcese trapasis la triagradan/universitatnivelan ekzamenon:

Poul Jørgensen (1929)

Paul Neergaard (1931)

E. Ebbesen (1932)

Ago de la ekzamenaj kandidatoj 1928-2008			
	I	II	III
Knaboj/viroj:	12-69	13-70	25-71
Knabinoj/virinoj:	9-81	15-67	21-62

Je la unuagradaj ekzamenoj printempe 1952 plej brile sukcesis la nur 9-jara knabino *Jytte Bjørndal Mikkelsen*, nepino de la konata Esperanto-instruisto *Christian Graversen*.

Povl Skårup havis 12 kaj 13 jarojn, kiam li treege sukcese trapasis la unuagradan kaj duagradan ekzamenojn (1949, 1950).

1961 – en la aĝo de 69 jaroj – *Søren Olesen*, eksministro pri enlandaj aferoj, bone trapasis la unuagradan ekzamenon.

En 1944 *Viggo Ritzau* brile sukcesis ĉe la duagrada ekzameno, ankaŭ bone plenumis la ekzamenon pri instrukapablo. Li havis 70, respektive 71 jarojn.

En la aĝo de 81 jaroj *Aggi Norstrand* sukcese trapasis en 2001 la unuagradan ekzamenon

La nuna situacio

Tra la jaroj plurfoje oni reviziis la ekzamenan regularon; je la lastfoja en 1993 estis enkondukita *antaŭkondiĉa gramatika testo*. La dana gimnazia reformo necesigas novan revizion de la duagrada ekzameno, kiun dum la lastaj 30 jaroj trapasis entute nur 3 personoj! Pasintvintre la subskribinto plurfoje pri-traktis tion kun *Lis Thune*, la prezidanto de DEEK. Ni ambaŭ sentis ne havi la sufiĉajn fortojn por tiu granda laboro. Alia afero estas, ke longatempe ofte reagis al la regula ekzamen-anonco en la danaj Esperantogazetoj eĉ ne unu persono! Verdire, la nuna intereso pri la ekzamenoj estas malgranda. La ellaborado de la skribaj taskoj estas afero temporaba. La modesta ekzamen-kotizo tute ne kovras la kostojn; ĉiujn materialojn ni ja devas sendi kiel registritan poŝtaĵon, kaj nun la kaso estas tute malplena. Pro tiuj kaŭzoj *Lis Thune* kaj mi fakte decidis malfondi la sendependan DEEK. Pro sia subita forpaso la prezidanto ne sukcesis publikigi tion.

Danaj esperantistoj, kiuj deziras ricevi ateston pri siaj lingvaj kapabloj, do ekde nun anoncu sin al la *internaciaj ekzamenoj*, kiujn ILEI kutime aranĝas lige al la Universalaj Kongresoj kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj.

Por la Dana Esperanto-Ekzamena Komisiono

Mogens Rude Andersen

Ni ricevis jenan poemon de juna togolanda esperantisto, kiu eklernis Esperanton en 1997 kaj nun loĝas en Dakar, Senegalio:

Feliĉo

La feliĉo ne troviĝas en la mono,
en juvelaro aŭ eĉ en ora krono.
La feliĉo ne estas aĉetaĵo,
ĝi ne aperas per iu posedaĵo.
Ĝi veturas en ne luks-aŭtomobilo,
kaj ne flugas en privat-aviadilo.
Ĝi ne vivas en grandegaj riĉaj domoj,
aŭ en la agoj de festamantaj homoj.
Sed la feliĉo, kiel simpla floro.
Unue kresku en nia propra koro.
La feliĉo povas kuŝi en rideto.
aŭ ĝojokrio de infano.
La feliĉo povas kuŝi en fideleco,
aŭ kompreno de sincera amikeco.
Ĝi troviĝas oftege nur en simpla gesto,
pro kio tago povas aspekti kiel festo.
Ĝi malsama estas ja por ĉiu homo.
Ĉu li loĝas en domaĉo, aŭ luksa domo?
Unue kresku en nia propra koro.

WOUDJI kossi



Tago de la asocioj

Jen foto el la informa stando de la Esperanto-Kulturgrupo EKG dum la "Tago de la Asocioj" (Foreningernes Dag) sabate la 6-an de septembro en Solbjerg Plads, Frederiksberg.

La laborgrupo de EKG montris al la publiko kelkajn aspektojn de Esperanto kaj ĝia kulturo (interalie literaturo kaj muziko) kaj ankaŭ povis

oferti varmajn platkukojn kaj ĉokoladojn kun portreto de Zamenhof je modestaj prezoj. Kim Henriksen kantis en Esperanto, kaj ludis akordionon dum duona horo sur la muzika scenejo. Ni montris, ke Esperanto ekzistas kaj vivas bone.

Entute estis agrabla kaj sukcesa tago por EKG kaj la Komunumo de Frederiksberg.

Torben Svendsen

Blograporto

Ĉu vi memoras, ke mi informis al vi pri mia danlingva blogo pri Esperanto en la lasta numero de Esperanto en Danio? Jen ‘progreso/malprogreso-raporto’!

Mardon la 28-an de oktobro je la 10.34-a horo estis indikite en mia blogo – mi citas: ‘Din profil er i alt vist 22.516 gange. 218 visninger siden sidst’ (Via profilo estas montrita entute 22.516 fojojn, 218 depost lastfoje).

Mi komencis blogadi ĉefe pri Esperanto antaŭ 6 monatoj. Kelkfoje mi skribis dufoje en tago. Iom post iom mi spertis, ke kiam la titolo elektita ŝajnas negativa aŭ sensaciisma, multaj legas la kontribuon, kaj pluraj komentas la enhavon. Kiel en aliaj virtualaj kaj malvirtualaj komunumoj troviĝas konfliktemuloj kaj sensaciemuloj kies blogojn la legantoj tre volonte legas kaj komentas. La kontribuojn pri Esperanto oni malpli ofte legis aŭ komentis.

Kio estis atingita?

- 1) Dum 6 monatoj senkosta okulfrapa reklamo sur la unua paĝo de la retgazeto ”24 timer” – ju pli ofte la vorto Esperanto troviĝis en la blogoj, des pli grande la vorto estis prezentita.
- 2) Unu nova membro de KEK.
- 3) Kresko de 6 al 16 personoj en la virtuala Esperanta-grupo de “24 timer”, tamen preskaŭ neniuj el ili estas aktivaj kiel esperantistoj.


Mi demandas min, kion opinias homoj alklakintaj la vorton Esperanto, eltrovante ke 99% el la kontribuoj estas verkitaj de iu maljuna strangulino loĝanta en Vallensbæk Strand? Antaŭ du semajnoj mi decidis rezigni pri la projekto, ĉar ŝajnis al mi, ke krom la helpo de tri samideanoj el Aŭstralio, Meksiko kaj Svedio malmultaj el vi memoris eniri la paĝon. Tial mi decidis, ke mi ne plu malŝparu la tempon.

Tamen ek de tiam eĉ se mi ne multe skribis, daŭre jam alvenas alklakante la profilon 1.604 vizitantoj (07.11. 2008).

Tial malgraŭ ĉio, eble valoras daŭrigi la agadon. Mi scias, ke multaj el vi ne estas retemaj, tamen kelkaj el vi estas tiel retemaj kaj informitaj pri Esperanto kiel mi. Do, se vi havus la tempon kaj la emon viziti la retejon <http://24.dk/user/crabapple>, mi dankos al vi, ĉar mi daŭre blogados almenaŭ ĝis la fino de la jaro.

Ĉu vi opinias, ke mi estas grumblema? Jes, mi grumbletas! Neniu petis min ekblogi, tial mi ne rajtas riproĉi iun ajn. Tamen ne nur temas pri tiuj ĉi spertoj, temas pri plorinda tendeco: oni ignoras la agadojn de aliaj, ĝis oni trovas la eblecon kritiki ilin. Kion vi opinias, ĉu tio ne estas unu el la kialoj de la lamentinde multaj kabejoj de tiom da relative novaj adeptoj?

Betty Chatterjee



Kaj Čumbelić-Røssum

08.05 1928 – 05. 09.2008

Kaj ne plu estas inter ni. Antaŭ kelkaj jaroj lia malsano fariĝis tiel grava ke li ne plu partoprenis la kluban vivon kaj la kongresvojaĝojn. Li ne plu verkis, tradukis aŭ kantgvidis.

Kaj estis unu el la veteranoj kiuj mem studis Esperanton. Jam kiel juna knabo li trovis Esperanto-lernolibron kiun lia patrino aĉetis por si mem. Ŝi neniam trovis liberan tempon por eklerni Esperanton, sed la 16-jara Kaj ŝteladis la libron dumnokte, kaj pere de poŝlampo, en sia lito legis kaj entuziasme eklernis la lingvon. Li vigle agadis kaj vojaĝis lande kaj eksterlande. Dum sia longa

Esperanto-vivo li korespondis kun du plum-amikinoj ĝis sia morto.

Profesie li estis civil-ekonomo kaj per sia sperto li multe helpis en la danaj kluboj, diversmaniere. Kaj estis diligenta kaj talenta tradukanto. Ofte ĉe klubvesperoj ni kantis konstatante, ke ankaŭ tiun kanton li tradukis. Kaj havis specialan humoron, li estis inspira, kaj influis al la bona etoso. Dum multe da jaroj li partoprenis internaciajn Esperantajn skisemajnojn. Kelkaj komunaj vojaĝoj kaj travivaĵoj kun li tra eŭropaj landoj restos neforgeseble ĉe ni ĉiuj. Memore al nia kara amiko kaj lia vivo, ni daŭrigu kun ĝojo kanti la kantojn kiujn li amis.

Li mankas al ni klubanoj, li mankas speciale al sia edzino Ana, kaj pro tio ni memoru pri li, kia li estis: gaja, sprita, gentila... lia verkaro kaj lia humoro restu inter ni.

Li ripozu en paco.

Ana Ĉumbelić Røssum

Germana kaj Eŭropa kongreso



Centra placo de Herzberg

La 86-a Germana Esperanto-Kongreso kaj la 8-a Eŭropa Esperanto-Kongreso okazos en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, de la 28-a de majo ĝis la 3-a de junio 2009. La ĉeftemoj estos respektive "Esperanto por multkultura Eŭropo" kaj "Signifo de la falo de Berlina muro por interhomaj kontaktoj inter Orienta kaj Okcidenta Eŭropo".

Ekzistas speciala hejmpaĝo por la komuna kongreso:

<http://gek-EEK.esperanto-urbo.de>, kie ankaŭ troveblas aliĝilo. Paperperforman aliĝilon vi povas peti ĉe Arne Casper, nia landa peranto (vidu la antaŭlastan paĝon de ĉi tiu numero). Ne hezitu aliĝi – jam je la 30a de novembro 2008 finiĝas la unua, plej favorpreza aliĝperiodo!

Forpasis Günter Becker

Günter Becker (25.01.1930) , honora prezidanto de TEJO kaj de Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL), delegito kaj dumviva membro de UEA, mortis la 18-an de aŭgusto matene en Zweibrücken (Palatinato/Germanio) sekve de grava malsaniĝo. La entombiga ceremonio okazis la 21-an de aŭgusto en Blieskastel (Sarlando). Ĉeestis pli ol 150 funebrantoj, inter ili ankaŭ 12 membroj de SEL. La Prezidanto de SEL, Oliver Walz, faris la nekrologon.

S-ro Becker eklernis Esperanton tuj post la milito kaj ekde 1951 aktivis en la Esperanto-movado. De 1956-1964 li estis prezidanto de TEJO, poste li fariĝis ĝenerala sekretario de UEA, kaj de 1957 ĝis 1973 li estis ankaŭ prezidanto de SEL. Antaŭ kelkaj jaroj li finfine fondis la “Becker-Meisberger-Instituton” por realigo de sia malnova ideo konservi tion, kion kreis li kaj lia edzino Maria, kiu mortis jam antaŭ ok jaroj, la belan domon kun la abunda teknika ekipaĵo por kapti radio- kaj televidelsendojn el la tuta mondo, la ampleksan bibliotekon, la kolekton de gazetoj kaj dokumentoj kaj ĉiuspecajn aŭdvidajn materialojn.

Laŭ informoj de la SEL-estraro

Forpasis Bernard Golden

La 19-an de oktobro en la aĝo de 82 jaroj forpasis la konata esperantisto kaj dumviva membro de UEA, Bernard Golden. Bernard Golden naskiĝis la 23-an de novembro 1925 en Newark, Nov-Jerzejo, Usono. Li estis arkeologo kaj aŭtoro de pli ol 1.800 artikoloj, recenzoj, beletraĵoj kaj tradukoj en Esperanto. Lia verkado estis tiel abunda, precipe sed ne nur en la esperantologia kampo, ke iutempe oni uzis la neologismon ”goldeni” en la signifo ”abunde verki por ĉiaj periodaĵoj”.

Li lernis Esperanton en 1946, edziĝis al hungarino kaj ekloĝis en Hungario en 1971. Ankaŭ liaj du filoj scias Esperanton. Bernard Golden estis multjara korespondanto de la internacia magazino *Monato*, ano de la Akademio de Esperanto, estrarano de Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. Li zorgis pri la pli ol mil Esperantaj terminoj en *Dictionarium museologicum* (1986). Ankoraŭ ne ekzistas kompleta bibliografio de lia vasta verkaro.

[ret-info]

TEJO 70-jara

Jam en la 20-aj jaroj ekzistis apartaj junularaj Esperanto-grupoj, sed la antaŭulo de la nuna TEJO, *Tutmonda Junular-Organizo*, estis fondita en la unua IJK, *Internacia Junulara Kunveno* en la urbeto Groet, Nederlando, en 1938. Komence ĝi havis la karakteron de instruista kontakto al lernantoj; ekzemple de la komenco ĝis 1951 la prezidanto estis Pieter Krijt el Nederlando. Sed iom post iom, tute malrapide, la organizo proksimiĝis strukture kaj organize al UEA.

La unua paŝo estis nomi IJK *kongreso* (jam ekde la tria). En 1952 TJO fariĝis la nuna *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*, kaj en 1956 ĝi fariĝis sekcio de UEA. Tamen nur en 1971 ĝi finance kaj administre plene integriĝis.

Dum multaj jaroj TJO kaj TEJO kiel membroorganon uzis la revuon *La Juna Vivo*, kiu ekzistis antaŭ la organizo mem, same kiel revuo Esperanto de UEA – kaj ĝuste tie TEJO ricevis specialan rubrikon, kiam La Juna Vivo ĉesis. En 1963 estis fondita *Kontakto*, revuo pri ekstermovadaj sociaj temoj, grava paŝo en tempo kiam ne ekzistis la sendependa *Monato*. De 1983 ekzistas ankaŭ la membroinformilo *TEJO Tutmonde*.

Apartan jarlibron TEJO neniam eldonis, sed de post 1974 ĝi administras la reton de gastigantoj *Pasporta Servo*, kiun oni nun intencas transformi al reta formato. En 1981 BEMI (*Biciklista Esperantista Movado Internacia*) fariĝis la unua fakasocio de TEJO, kaj hodiaŭ ekzistas ankaŭ EUROKKA (pri muziko) kaj E@I (t.e. Esperanto ĉe Interreto).

TEJO ankaŭ havas viglajn kontaktojn al instancoj ekster la Esperantomovado, nuntempe ekzemple la *Eŭropa Junulara Forumo*. Dum la 1970-aj jaroj la eksteraj rilatoj estis fonto de doloro inter TEJO kaj UEA, sed ŝajnas ke la organizo estas sufiĉe forta por venki internajn malkonkordojn. Tio ankaŭ faciliĝas per tio ke la nuntempaj gvidantoj kutime mem estas eksaktivuloj de TEJO; ekzemple la multfoja UEA-prezidanto Humphrey Tonkin estis la unua redaktoro de *Kontakto*, kaj la nuna prezidanto Probal Dasgupta junaĝe servis kiel volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo.

Paperaj gazeteltondaĵoj

Aprilo 2008 (suplemento):

Fyens Stiftstidende: "Foto de la tago" montras Ole Nederland 1958

Liza Marklund: "Nobels Testamente" 2006 mencias dufoje Esperanto-förlaget, Stockholm

Julio 2008 (suplemento):

Berlingske Tidende Sport skribas pri "cykel-esperanto"

Aŭgusto 2008:

Ugebladet Næstved: Asocia registro

Krucvortenigmo en Sjællandske, Næstved

Politiken ATS

FN-forbundet i Danmark: Lingva festivalo 2008

Septembro 2008:

Modersmål-Selskabet: Invito al Modersmål-Prisen 2008

Kristeligt Dagblad, Kort sagt: Glem ikke esperanto

FN-forbundet: Kalendaro mencias lingvan festivalon

Jernbanefritid: Kongrestur i Polen

Oktobro 2008:

Jernbanefritid: DEFA og Verdensesperantoforeningen

Politiken, Jørn Lund, sprog: "Man kan næsten savne en esperantist"

Prelego de Lene kaj Jan Niemann menciita en Næstved-Bladet kaj Sjællandske, Næstved

Helsingør Dagblad, debat: Paco og gensidighed på aftenskoleniveau

Daŭre memoru sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

Kluba vivo: Kopenhago

Prezidanto: Betty Chatterjee, Vejlegårdsparken 20, st.th., 2665 Vallensbæk Strand. Telefono: 38 89 10 13, retadreso: kek@esperanto.dk. Kunvenoj okazas ĉiun lundon je la 19.30 en la Kulturdomo, Dortheavej Dortheavej 61, 2400 Kbh NV. Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj aĉeteblas en la kafejo.

Okazis

Kiel kutime KEK aranĝis budon dum la Tago de Integriĝo la 30-an de aŭgusto en Nørrebro. Belis la vetero kaj alvenis amaso da homoj. Sufiĉe multaj el ili vizitis nian budon. Eĉ se ni ne varbis novajn membrojn, ni sukcesis informigi ilin pri la daŭra ekzisto de Esperanto. Ni disdonis flugfoliojn pri la lingvo-festivalo kaj la malferma vespero de KEK. Plue ni ĝuis la agrable internacian etoson.



Okazos

- 10.11 Stanislaw Mielczarek prelegos pri Romaoj (ciganoj).
- 17.11 Venontjara UK kaj Revua vespero
- 24.11 Studgrupo informo pli poste.
- 01.12 Eliza Kehlet prelegos pri sia vivo.
- 08.12 Numerludo.
- 15.12 Librotago. Birthe Trærup prezentos sian tradukon de la H.C. Andersena libro: 'En Digters Bazar' (*vidu la ĉi-sekvan artikolon*).

2009

- 05.01 Novjara Babilejo.
- 12.01 Prelego: Laoso – la estonteco kaj la turismo. Jan kaj Lene Niemann
- 19.01 Studgrupo. Faktoj kaj Fantazioj ĉapitro 39: Fabelo el Irlando. Betty gvidas.

26.01 MUZIKA KVIZO. La partoprenantoj sidos en grupoj, aŭskultos pecojn da muziko el diversaj landoj de la mondo, kaj devas diveni la landon kaj respondi aliajn demandojn. Post la demandoj la partoprenantoj povos rakonti iomete pri eventualaj spertoj de la aktuala lando, ekzemple pri la Esperanto-situacio en tiu lando (Bent Jensenius).

Zamenhoftago en Kopenhago

Lundo la 15-a de decembro estas grava tago por la esperantistaro. Unue tiu tago estas la naskiĝdatreveno de la aŭtoro de nia lingvo Ludoviko Zamenhof, kiu naskiĝis en 1859. Tamen la tago ankaŭ gravas, ĉar estas la tago de la libro. Jen vere festinda okazo! Ĉi-jare la klubo de KEK havos la grandan honoron kaj plezuron inviti Birthe Trærup al la klubo por ke ŝi prezentu al la membraro sian ĉi-jare eldonitan tradukaĵon de la vojaĝpriskribo de H.C. Andersen, kiu titoliĝas:

H.C.Andersen en Oriento
Vojaĝpriskribo de Poeto, el Bazaro de Poeto.

En la jaro 1840 la pasie vojaĝema H.C.Andersen veturadis tra Italio kaj Grekio ĝis Konstantinopolo kaj post tio li revenis hejmen per la Nigra Maro, Danubo kaj Vieno. Liaj postultitaj kaj inspiritaj spertoj dum tiu longa vojaĝo estas la temo de la libro 'Bazaro de Poeto', kiu estis unufoje eldonita du jarojn poste.

Eĉ se mi mem kapablas legi tiun ĉi en la dana, valoris al mi la legado de la esperantigita verko, kiu enhavas taŭgajn ilustraĵojn kaj eltondaĵojn de Andersen.

Ne maltrafu la eblecon aŭskulti la prezentadon de tiu ĉi libro!

Tiu ĉi libro, kiu estus dezirinda donaco por eksterlandaj geamikoj, estos aĉetebla aŭ antaŭe ĉe Arne Casper aŭ en la klubo la 15-an de decembro.



Nova Esperanto-muzeo

La urba muzeo en Svitavy, Ĉeĥio, ĝis nun havis ekspoziciojn pri Oskar Schindler, kiu dum la milito savis mil judojn en sia fabriko, pri historio de lavado de tolaĵoj kaj pri la urba rezervejo de monumentoj. Nun oni aldonas Esperanto-muzeon en la historia Domo Ottendorfer, kiu troviĝas tuj trans la ŝoseo. La muzeo estos videbla tra fenestro en te-trinkejo. La estro de la tetrinkejo havos ŝlosilon kaj enlasos la interesatojn.

[ret-info]



Internaĵo de la Esperanto-muzeo

Kluba vivo: Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. – Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111, ordinare je h 19.30, sed vidu ĉe la unuopaj aranĝoj.

Okazos

Ve 14.11 je h 19.00: DEFA-kunveno pri la ĵus okazinta KAEST. Ĉiuj estas bonvenaj.

Ve 21.11 je h 19.30: Danlingva prelego: Ileana Schrøder prelegos i.a. pri la praga manifesto. Komuna manĝado je h 18.00 por dezirantoj je po 40 kr. Aliĝo plej malfrue 18.11.

Ve 05.12 je h **14.00**: Kunveno kun ĉapitro 26 de *F+F*.

Ve 12.12 je h 13.00: Kristnaska lunĉo. Aliĝo necesa plej malfrue 09.12.

2009

Ve 09.01 je h 19.30: Danlingva prelego. Temo kaj preleganto ne nun konataj. Komuna manĝado je h 18.00 kiel 21.11. Aliĝo plej malfrue 06.01.

Ve 16.01 je h 19.00: DEFA-kunveno. Ĉiuj estas bonvenaj.

Ve 30.01 je h **14.00**: Kunveno kun trakto de ĉapitro 27 de *F+F*.

Ve 06.02 je h 19.30: Danlingva prelego. Temo kaj preleganto ne nun konataj. Komuna manĝado je h 18.00 kiel 21.11. Aliĝo plej malfrue 03.02.

Ve 13.02 je h 19.00: DEFA-kunveno. Ĉiuj estas bonvenaj.

Ve 20.02 je h 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN. Antaŭa kafo/teo je kosto de la unuiĝo.

Ve 27.02 je h **14.00**: Kunveno kun trakto de ĉapitro 28 de *F+F*.

Ve 06.03 je h 19.30: Danlingva prelego. Temo kaj preleganto ne nun konataj. Komuna manĝado je h 18.00 kiel 21.11. Aliĝo plej malfrue 03.03.

Ve 13.03 je h 19.00: DEFA-kunveno. Ĉiuj estas bonvenaj.

Ve 20.02 je h 19.30: Kunveno kun trakto de ĉapitro 29 de *F+F*.

Ve 03.04 je h 19.30: Sezonfina vespero kun regalaĵoj, ludo kaj ujutno.

Okazis

Ni komencis la aŭtunan sezonon la 19.09. per detala trakto de nova ĉapitro de la legolibro de Marjorie Boulton *Faktoj kaj Fantazioj*.

03.10. rakontis Lene kaj Jan Niemann kaj montris tre belajn lumbildojn pri Laoso antaŭ aŭskultema publiko – ankaŭ de eksteraj rondoj.

10.10. denove *Faktoj kaj Fantazioj* estis la temo.

La DEFA-kunveno 17.10. temis pri la venontjara 100-jariĝo de Esperanto ĉe la fervojoj.

31.10. posttagmeza trakto de *F+F*.

RevuServo de DEA

Denove la nova jaro alproksimiĝas, kaj nun estas tempo mendi revuojn.

Se vi deziras aboni, skribu aŭ telefonu por ĝirilo - sed bonvolu memori, ke la limdato por enpago estas

la 10-a de decembro 2008

Kontaktu min telefone 3920 6348 aŭ 2140 8487.
Rete: arnecasper@dbmail.dk

Pagonte, bonvolu uzi la kodo(j)n:

Kodo	Nomo	abonprezo DKK
OdE	Ondo de Esperanto	285.-
LE	La Espero	170.-
RE	Revuo Esperanto	280.-
NV	Naturista Vivo	120.-
LJ	La Jaro	40.-
JA	Juna Amiko	110.-
Mon	Monato	366.-
BA	Beletra Almanako	250.- (3 numeroj en 2009)

Abonprezoj por Literatura Foiro kaj Femina bedaŭrinde ne estas ricevitaj.

Diversaj scenoj el la Lingvofestivalo

